



**“MEMOFERO ESTAS FUNDAMENTA
POR KOMPRENI LA LUKTON DE LA KURDAJ INOJ”**

Alba Sotorra. Filmreĝisoro.

Sotorra reĝisoris dokumentfilmon pri la partizaninoj, kiuj batalas kontraŭ la Islama Ŝtato en Roĵavo. Por ĝin filmi ŝi milicaniĝis dum kelkaj monatoj.

La filmreĝisoro Alba Sotorra (Reŭzo⁽¹⁾, Katalunio. 1980) estas la verkinto de la dokumentfilmo “Komandanto Arian. Historio pri inoj, milito kaj libereco”⁽²⁾. Fakte, ŝi filmis la vivon de samnoma milickomandanto. Spite al la danĝeroj la reĝisoro estis membro de partizantaĉmento dum kelkaj monatoj kun kamerao enmane, anstataŭ armilo. Hodiaŭ(*) oni montros la filmon en Donostio kaj morgaŭ en Irunjo.

Kion havis la siria milito, tiom altira, por ke vi pretu riski vian vivon?

Ke la virinoj ĝin riskas por defendi siajn rajtojn.

Kiel naskiĝis la ideo pri la filmskizo?

Komence, la intenco estis filmi historion pri la potencigo de la virinoj, en kiu la ĉefrolanto revenos venkinta el misio; tial mi elektis la komandanton Arian. Ŝi estis komandanta inbatalionon en la operaco, kiu finos la sieĝon de Kobano. Sed dum la filmado oni vundis Arian, kaj la scenaro tute ŝanĝiĝis. Estante dokumentfilmo la muntado estas tre stranga.

Kial?

Ĝi estas kompleksa. Dum la rakontado estas saltoj antaŭen kaj malantaŭen; intermetiĝas templinoj. Dum ni pluiras konante la komandanton Arian, ni lernas pri ŝiaj malsamaj profundecoj.

Kiel estas por virino filmi primilitan dokumentfilmon meze de milito?

En tiu ĉi kazo, ĝi estis io mirinda ĉar mi estis ĉirkaŭita de virinoj. Mi konis inojn potencajn kaj multpovajn. Kun ili mi sentis min ĉiam tre sekura; inter ni estis forta sento de amikeco kaj frateco.

Ĉu facilis?

Ne, sed veras, ke tio, kio al iu komence ŝajnas malfacila, poste rezultas ne tia. La timo ĉiam aperas, sed, dum tia procezo, la plej kruela okazaĵo estas perdi dumvoje la faritajn amikojn. Tre kruelas agnoski, ke ino mortis por defendi siajn rajtojn.

Vi mergiĝis sola en tiu projekto. Ĉu tio influis?

Se mi ne estus irinta sola, mi ne kapablus eniĝi laŭ maniero tiel intima. Mi iris sola, sed neniam mi sentis min tia. La partizaninoj min traktis kiel unu pli. Eĉ pli: ili donis al mi uniformon, por ke mi sentu min pli sekura.

Ĉu vi iam timis perdi la vivon?

Foje jes.

Ĉu la risiko indis?

Foje, oni devas riski; almenaŭ se oni volas partopreni en la transformad-procezo. Sen ion ajn riski oni nenion ŝanĝas. Same, se risiko estas profita, indas akcepti ĝin. Al mi ŝajnas, ke la riskoj tie akceptitaj indis.

Kiel akceptis vin la partizaninoj kaj la Komandanto Arian?

Mi estis unu plia en la taĉmento. Anstataŭ iri armita, mi portis kameraon por filmi tion, kion ili faris. Estis tre bele kundividi kun ili tiun sperton.

Kiel vi komuniĝis?

Pleje angle, kaj mi lernis iomete la kurdan. Sed preskaŭ ĉiam per la universala signolingvo; la signoj estas tre efikaj, kiam ekzistas la volo interkompreniĝi.

Kiom da tempo vi estis filmanta?

Inter 2015 kaj 2018 mi iris kaj revenis. Sep-ok fojojn mi iris, kaj ĉiufoje mi restis dum du monatoj.

Kiel kontribuas al la filmo la scenoj, en kiuj Arian aperas vundita?

Komence, mi volis speguli la ideon pri la inpotencigo sed, vidinte la komandanton Arian vundita mi komprenis, ke la ideo kuŝanta surfone estis la memofero. Memofero estas fundamenta por kompreni la lukton de la kurdaj inoj, kaj tre grava por eviti la idealigbildon de la peniga revolucio, kiun ili estas farantaj.

Krom la malmolaj momentoj, vi ankaŭ montras, kio okazas inter la bataloj.

Aperas la ĉiutaga vivo. Tre speciala estas ilia ĉiutageco, kaj tre interesa. Ĉar ĝi malsimilas disde tiu de la viroj.

Ĉu vi komprenas la uzon de armiloj por protekti?

Mi tion komprenas kaj subtenas. En tia senpaca kunteksto ne eblas ĉiuj demokratiaj vojoj. La vojo estas forfuĝi aŭ preni armilon por sin defendi.

Je persona nivelo, kiel influis sur vin la historio de komandanto Arian?

Ĝi estis mejloŝtono. Mi ne estas la sama persono ol je la komenco de la dokumentfilmo. Nun, mi multe pli valoras la aferojn kaj pli facile adaptiĝas al la situacioj. Ili montris al mi, ke ni havas kapablon por rezisti kaj entrepreni tion, je kio ni kredas. Krom tio, mi havas solidan emocian ligan kun la kurda popolo.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

(1) Reus, en la kataluna.

(2) "Comandante Arian. Una historia de mujeres, guerra y libertad", en la hispana.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Zihara Jainaga Larrinaga.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 28-an de Majo 2019-a.

Tradukis: NXC. Julio 2019-a. Provlegis: DS.

